

bulteno

de Esperantista Klubo en Praha

Věstník Klubu esperantistů v Praze

N-ro 3/2008 (184)

Listopad/novembro 2008

Z obsahu – el la enhavo:

Antaŭ 90 jaroj naskiĝis Ĉeĥoslovakio	2
M. Vejlupek: Vortigo al la homa testamento	3
Z. Bergrová: Kun Kontuziaj Oreloj	4
J. Harcuba: Vitrogravuro – mia heredaĵo	8
V. Ludíková: Novoročenka 2002	11
K. Bártlová: Poemo skribita de Petr Bezruč	12
J. Karen: Se mi eble ne revenus...	15
Č. Vidman: Saxofonie	18
S. Zedníková: La alia geometrio	19

Zamenhofova ulice v Praze.

Z rozhodnutí komise Magistrátu hl. m Prahy jedna z nových ulic v pražské části Štěrboholy dostala jméno „Zamenhofova“. Tím bylo splněno dlouholeté přání esperantistů, aby také v Praze byla ulice nesoucí jméno tvůrce esperanta.

Zamenhof-strato en Prago. Laŭ decido de komisiono de la Magistrato de la ĉefurbo Prago unu el la novaj stratoj en la praga kvartalo Štěrboholy ricevis la nomon „Zamenhof-strato“.

Agrablajn kaj ĝojplenajn Kristnaskajn festojn kaj pacon, feliĉon kaj sanon en la Nova jaro 2009

Al ĉiuj klubanoj kaj ankaŭ al ĉiuj legantoj de la Bulteno deziras la komitato de la Esperantista Klubo en Praha

La solena Zamenhof-vespero kaj samtempe gaja Kristnaska vespero de nia klubo okazos ĵaŭde la 11-an de decembro 2008 inter la 14-a kaj la 17-a horo jen nia kunvenejo en la strato Ve Smečkách n-ro 25.

La regulaj kunvenoj de la Esperantista Klubo en Praha okazas ĉiuĵaŭde inter la 14-a kaj 16-a horoj en la kunvenejo en Praha 1, Ve Smečkách n-ro 25.

Post la Zamenhof-vespero la 11-an de decembro 2008 la plej proksima kunveno okazos ĵaŭde la 8-an de januaro 2009.

Antaŭ 90 jaroj naskiĝis Ĉeĥoslovakio. Ĝi naskiĝis en Francio.

La 28-an de oktobro 1918 en Prago estis oficiale proklamita Ĉeĥoslovaka respubliko. Post preskaŭ kvarcitra jaro jen la Habsburga monarkio ĉeĥoj akiris denove sian propran ŝtaton kaj kune kun slovakoj ili formis Ĉeĥoslovakion.

Post la eksplodo de la Unua mondmilito prof. T. G. Masaryk kun sia kunlaboranto Edvard Beneš fondis en Parizo Ĉeĥoslovakian nacian konsilantaron, kies celo estis per politika kaj diplomacia laboroj sur internacia kampo krei memstaran kaj sendependan ĉeĥoslovakian ŝtaton. Multe helpis al ili la slovakoj Milan Rastislav Štefánik, kiu vivis en Francio kaj kiu havis bonajn rilatojn kun iuj francaj politikistoj. Krome la politikan laboron de Masaryk elstare subtenis la formiĝo de ĉeĥoslovaka armeo, al kiu aliĝis la ĉeĥaj kaj slovakaj soldatoj fuĝintaj el aŭstro-hungara armeo, kaj ankaŭ la ĉeĥaj kaj slovakaj elmigrintoj vivantaj en diversaj landoj. La ĉeĥoslovaka armeo sukcese partoprenis kelkajn gravajn batalojn de la unu mondmilito.

Francio ebligis sur sia teritorio la formiĝon de la ĉeĥoslovaka armeo, konsistanta el kelkaj miloj da volontuloj. La ĉeĥoslovakajn volontulojn la franca registaro koncentris en militistan kampadejon Kléber apud la lorena urbo Darney. La volontuloj formis la 21-an kaj la 22-an regimenton de ĉeĥoslovakaj legianoj; vestitaj en bluaj francaj uniformoj kaj kun berete kun fazono de ĉeĥa leono ili ekzercis sin por bataloj.

La 30-an de junio 1918 vizitis la militistan kampadejon ĉe Darney la franca prezidanto Raymond Poincaré kun la ĉeĥa reprezentanto Edvard Beneš kaj antaŭ la viciĝintaj ĉeĥoslovakaj regimentoj li proklamis la rajton de Ĉeĥoslovakio pri sendependeco. Li transdonis al la legianoj la ĉeĥoslovakian flagon kiel simbolon de sendependeco kaj de reakirita suvereneco. Tiel en la urbo Darney en Francio naskiĝis Ĉeĥoslovakio, kvar monatojn pli frue ol tio okazis en Prago.

Naŭdek jarojn poste, la 30-an de junio 2008, sur la sama loko ĉe Darney okazis rememora solenaĵo pri la proklamo de sendependa Ĉeĥoslovakio en Francio. La solenaĵon partoprenis francaj kaj slovakaj reprezentantoj kaj ankaŭ la ĉeĥa ĉefministro Mirek Topolánek kaj la ĉeĥa ministrano de defendo Vlasta Parkanová.

Před 90 lety se zrodilo Československo. Narodilo se ve Francii.

28. října 1918 byla v Praze oficiálně vyhlášena Československá republika. V zahraniční československé vojenské jednotky úspěšně svedly řadu bitev a na francouzském území ve vojenském táboře Kléber u města Darney byly soustředěny dva pluky československých legionářů. Dne 30. června 1918 je navštívil francouzský prezident Raymond Poincaré s českým ministrem Edvardem Benešem, předal jim československý prapor a vyhlásil právo Československa na nezávislost. Tak bylo nezávislé Československo vyhlášeno ve Francii o čtyři měsíce dříve než v Praze. Oslav 90. Výročí této události dne 30. června 2008 se v Darney vedle francouzských a slovenských představitelů zúčastnil i předseda české vlády Mirek Topolánek a ministryně obrany Vlasta Parkanová.

(-jpa-)

Vortigo al la homa testamento de la tradukistino kaj verkistino Zdenka Bergrová (+ 22. 5. 2008)

Nevidebla hundo, <http://neviditelnyes.lidovsky.cz/>, la 4-an de junio 2008

Robinioj floras, ja neĝdunoj, / al ĉiu feliĉo jaroj diros stop (Papilioj floras, penetreme bonodoras). Foriris Zdenka Bergrová. En marto ŝi festis la okdekkvinjariĝon kaj kiu rerigardis kun ŝi, tiu ekkonis, ke malantaŭ la multtavola intelekto-krea tutviva aktiveco estas tiom da investic energio, ke povas ĝin plene esprimi neniuj biografio, nekrologoj tiom malpli. Ĉar Zdenka Bergrová estis senmezura laborema kaj senmezura klera virino, kiun ne preterpasis la mondo kun sia senĉesa moviĝo antaŭen, kun sia antaŭdestino al la tutmondigo de ĉio homa, kun sia antaŭdestino al persista sinperfektigo teknologia laŭ leĝo de la dialektika evoluo de la spirito de l' kosmo.

La komprenon de la mondo kaj de ties tagoj fare de Z. Bergrová karakterizas jam la aliĝo de la tradukistino al la Esperanta kulturo. Ne estas objekto de la pripenso, kian estontecon havas la Esperanto-movado, sed estas fakto, ke Zdenka Bergrová estis konvinkita pri la bezono de komunikado de la monda publiko, pri la bezono trovi manieron de tia komunikado. Konsidere tiun ĉi filozofion kompreneble ne surprizas la pozitiva akcepto de la interreto fare de Z. Bergrová jam ĉe la ŝanĝo de jarcento, kiam la verista komunumo alpaŝis al la elektronika medio antaŭ ĉio kiel al malamiko de la literaturo kaj de la presita libro precipe. Zdenka Bergrová apartenis al tradukistoj kaj verkistoj kleraj. Tial ankaŭ en la realo tiel nomata virtuala, aŭ – se la legando permesos – en la paralela mondo-ciberspaco ŝi restas konstante ĉeestanta, publikigante ja ankaŭ en la interreto, evidente plej frue en la literatura servilo de Prácheňské rezonance (Praĥenaj Resonancoj) 2000 – 2010. Jen Z. Bergrová enkondukis sin en la revuo Chůdové kořeny (jam ekde la dua numero en la jaro 2002: per propra verkado, per tradukoj de Jeseník), en la eldonserio ZONTY (2003: per la fabelkolekto Šimni kaj aliaj simiaĵoj; per poemciklo Mia rigardo kuras post la fluo) kaj en la Eldonserio de gastoj (2004: El la sonetoj de William Shakespeare).

La atentigon pri la progresema pensado ja ne eblas substitui per la artistina interna mondo de impresoj, en kiu regis senĉesa dialogo inter la sopko kaj la sobra rigardo. En la poemo Nur al mi la artistino verkis: *Mankas al mi sekursento. / Ĉu krepusko tio nura? / Ne kuracas Mond-Entento, / nenion ĝi asekuras. // Bataloj kaj ŝvito sanga / premiitaj ĉi ne estas, / ne savas vivsenton strangan. / En mi mem la ĝojo nestas.* Kiam Z. Bergrová partoprenis la laŭteman blokon La dimensioj de Dio kaj dio en la revuo Chůdové kořeny, en sia kontribuaĵo ŝi antaŭmenciis: *Kosmo – universo? / Kiu Disinjo? / Kies rajt-diverso, / kiu kreditor? / Disinjoj multaj, / fore Atlantid', / el tio rezultas / miro kaj malfid'. / Biblia sufero / de Jesuo Krist'. / Kial la galero, / de turmentoj list'? / Neniu sufero - / tia idili' / laŭ dio malvero. / Ĉu kredi je Li? / Pri amo mi kredas, / pri la konscienc', / tion mi ne cedas / al di-kompetenc'.*

Zdenka Bergrová forpasis. *Vi ĝin ankaŭ vidas, / lumeskantan firmamenton. / Sub ĝi fluas for torento, / agordas novajn tonou. / Muteco de pontoj nokte / ja kontra, / do malmultajn vortojn.* (Vi ĝin ankaŭ vidas...)

(Esperantigis Jiří Patera, la versojn tradukis Jaroslav Krolupper.)

Zdenka Bergrová

Kun Kontuzitaj Oreloj

(Rememoroj)

Ankoraŭ pri la Maja insurekcio en Prago 1945

Ni pendigis ĉeĥoslovakajn standardojn. Ni loĝis en la kvartalo Pankrác en la strato tiam de Libuše, nun de Marie Cibulková, en n-ro 11. Paĉjo havis tiam 46 jarojn, panjo 44, la fratino 17 kaj mi 22 jarojn. Ĉe la angulo de stratoj – nun de M. Cibulková kaj de Sinkule – estiĝis barikado. Mi estis sur ĝi tuje kde la komenco. En trapasem de la domo, kie estas gastejo, aperis armiloj, sed ni estis sur la barikado pli multaj, ol estis la nombro de fusiloj. Mi kuris al la Jedlička-instituto inter la pordejoj de Vyšehrad por pansaĵoj de unua hlepo; mi kudris por mi brakbendon kun ruĝa kruco, mi havas ĝin ĝis nun. Revenvoje de la Jedlička-instituto mi vokis „Saltuon!“ al du buboj, kiuj resalutis min kaj per unusola fasilo ili celis de la mungo ĉe la Tábor-pordejo al la ĉefedifico de la Jedlička-instituto, kie tiam estis lazareto de SS. Se okazus interpafiĝo... sed la SS-anoj kapitulacis, mi ne ĉeestis tie, nur tuj post la revolucio mi vidis tiujn SS-anojn forigi la barikadon en Beneš-strato, nun strato Na Pankráci. Nia barikadestro havis la nomon Jirka. Mi estas kun li kaj kun tri knaboj sur fotografaĵo, ĝi estas nur de la 15-a de majo, kiu havus la ideon foti sin pli frue. Sur la dorsa flanko estas skripte: Al Zdenka je rememoro de la tempo de pragaj barikadoj Jirka. – Pankrác, Prago XIV, 15. 5. 45. La okan de majo venis ordono, ke ni lasu traveturi Wehrmacht, kiu proksimiĝis, laŭdire tio savos la subminitan Kastelon. Ni ne povis tuj obei, ĉar proksimume de ni la Wehrmacht-anoj faris kanajlaĵojn kaj ni pri tio ne nur ricevis informon, sed dum la tutat ago mi helpis en lazareto ĉe la rusa gimnazio, tio estis en la kelo de la kontraŭa domo. Oni alportadis tien vunditojn kaj mortantojn. Laŭ demandaro mi devas nomi rezistantojn. Sur nia barikado estis ekzemple la filo de tajloro Malina, ĉu li vivas kaj kie – tion mi ne scias, sur barikado oni ne prezentas sin. Laŭnome mi povas noti la aktivajn insurekcianojn el nia domo: ambaŭ miaj gepatroj, sinjoro Hronek, sinjoro Vykoukal – ili havis eĉ fusilon. Inĝeniero Benda ne, tiu zorgis pri provizoj, kiujn ĉe la komenco de la insurekcio li akiris verŝajne el germanaj provizoj, sed mi verdire ne scias, de kie tio estis.

De sur tegmentoj longe pafis tiraljoroj. Mi portis manĝaĵon al la barikado, el subtegmento de la domo n-ro 13 aŭ eble 17 pafis kontraŭ min snajpero, rapide mi trakuris la baritan lokon, kie nun jam delonge estas domoj, mi restis vivanta. Inter la mortintoj, kiuj poste kuŝis en sokolejo, estis frato de mia kunlernantino Růženka Šternarová (nun jam delonge Martincová). Savis nin vlasovanoj, kiujn ni opiniis ruĝarmeanoj. Baldaŭ post la ĉefa fluo de la revolucio renkontis min la komandanto de nia barikado Jirka, forkondukis min antaŭ la ĉefedificon de la Jedlička-instituto, kie estis formiĝanta grupo, kiu celis al limregionoj, kie furiozis grupoj de Werwolf. Sed mi jam restis hejme. Tamen mi kulis po vlasovanoj kaj portis a lili varman manĝaĵon. Sinjorino Julie Hronková kaj mi prenis hejmen du eble dekjarajn knabojn kun maljunulaj vizaĝoj, por bani ilin. Ni lavis iliajn vestojn, kiuj estis laveblaj, kaj donis a lili ĉemizojn. Ili rifuzis esti senpedikitaj. Tial ni mem gardis nin kontraŭ pŝikoj. Baldaŭ poste mi ricevis medalon kun surskribo „Barikadano Pankrás, 5. – 9. 5. 1945“, ĝi havas n-ro 419. Mi havas ankaŭ originan legitimilon.

PhDr. Zdenka Bergrová, fraŭline Vovsová, loĝis kun sia edzo Věroslav Bergr, rezist-movadano en la ĉrkaŭaĵo de Lomnice nad Popelkou, en la sama strato de Marie Cibulková, sed en la n-ro 30/374.

Rememoro pri Mathesius

Mi havas kelkajn kontraŭdirajn rememorojn pri profesoro Mathesius. Tre esperiga estas unu nereakta. A. J. Šťastný diris al ni (al Věroslav kaj mi), ke al li profesoro Mathesius proklamis min sia poezie plej talenta lernantino. Ĉu li pensis tion serioze? La kontraŭdiraj rememoroj mian dubon nur konfirmas. Mathesius kunprenadis Milena Bláhová kaj min al vespermanĝo en Valdštejnán gastejon en Malgranda Urbo. Al Milena li kondukis ĝentile, min li ĉiam incitetis. Eĉ dum la instruado. Kiam tio foje kolerigis min, el vasta seminario en la granda aŭditorio, kie estis proksimume 130 gestudentoj, anstatŭ veni en malvastan seminarion, en kiun li akceptis proksimume dek studentojn en sian laborĉambron, mi iris hejmen. Sed por venigi min li sendis sian unuan asistanton Horáček. Tiu atingis min nur antaŭ la fakultato kaj alkondukis min reen. Tiam mi diris al mi – Mates havas humorŝanĝojn. Nome la profesoron ni nomis inter ni Mates (tio en la ĉeĥa estas marinita haringo). Kiam ajn mi aperis antaŭ li, li pistis inter dentoj (li primordis la malsupran artefaritan dentaron): „Kion ci kuraĝis skribi...“ – Inter miajn amatajn poetojn apartenas Josef Hora. Certe ne sola, aliaj estas Orten, Hrubín, Šrámek, Mácha, ili estas multaj. Foje multe pli poste, kiam Jiří Franěk proklamis nin la tradukista generacio de Mathesius, mi elkriis, ke ni estas la tradukista generacio de Hora. Kiam Hora mortis ĉe la sojlo de la libereco, mi sentis tion tre tragike, kaj mi verkis artikolon. Senpere gutis el ĝi la ruĝa sango de mia tiama mondkoncepto – kaj varmegaj, varmegaj larmoj...

Kaj mi iris kun la artikolo al Mates, konvinkita, ke li certe sendos min kun ĝi al Rudé právo (Ruĝa rajto – tiama ĵurnalo de la Komunista partio). Sed la sinjoro profesoro ekridaĉis. Kaj li ion aldonis. Mi ne plu scias kion, mi sentis tion kiel ne nur la malaprobbon de la artikolo, sed plie mi sentis tion ankaŭ malfavore al Hora. Mi ne scias, eble erare. Sed iam pli poste li mokis la tradukon de la poemo de Lermontov „Roka montpinto“ fare de Hora kaj evidente influita de Mathesius mi la mallongan poemeton tradukis post Hora, kaj mia traduko poste aperis en unu antologio post alia kaj mi per tio tiom pli konsideris mia tasko la tradukojn de Hora defendi, kaj tiel aperis eĉ polemikoj super la ĉeftraduko de Eŭgeno Onegin. Sed tiam ĉe la moko de Mates pri mia artikolo mi eklarmis, fariĝis mallumo antaŭ mi, kaj mi entute ne scias, kiel tio okazis, subite mi estis en iu sukeraĵejo kaj la profesoro trinkis ruĝan vinon kaj antaŭ mi kuŝis krema torto. -

Profesoro Mathesius foje elpistis: „Ci tiel devancas, ci ne edziniĝos.“ Sufiĉe longe mi ne volis edziniĝi por ne devi kuri, kaj mi ne plu estas tiel supermezure rapida, sed ĝis nun mi estas iam pro miaj opinioj soleca. Ekzemple – ke regas la murda kapitalismo, kaj ke ĝi estas tiel malproksima al demokratio kiel estis la totalismo al komunismo, tion mi rimarkis jam frue. Sed per kio la devancado de ideoj malhelpas la edziniĝon? Mi edziniĝis al Věroslav laŭ konsilo de malnova amiko. „Kial mi malebligus al li, ke li edziĝu al vi, ĉefe ne malebligu al li, kiam li volos divorci.“ Mi vivas kun Věroslav kvindek kvin jarojn kaj divorcon li eble jam ne postulos... Profesoro Mathesius ne estis preciza psikologo. Iam jes. „Cin sufiĉas puŝi kaj ci sputas versojn,“ li diris.

Verŝajne mi estis la lasta el lernantoj, kiu sukcesis viziti lin en malsanulejo. Neniun mi demandis pri la vojo, neniun malhelpis al mi iri, mi trovis lian ĉambron iel intuicie. Kiel kutime li atakis min: „Restu ĉe la pordo, mi havas hepatiton, por ke ankaŭ ci ne ricevu ĝin.“ Li ne havis nur hepatiton. Li havis kanceron. „Nu dankon, ke ci venis,“ li diris al mi kun adiaŭa rigardo...

(Esperantigis Jiří Patera)

Bohumil Mathesius (1888 – 1952), profesoro en la Filozofia fakultato de Karola Universitato en Prao, estis ĉeĥa poeto, tradukisto, publicisto kaj literatursciencisto. Elstaraj estis liaj tradukoj el la antikva ĉina poezio (Kantoj de la malnova Ĉinio), sed ĉefe li tradukis la rusan poezion (Puŝkin, Lermontov, Majakovskij, Jesenin k. a.) kaj ankaŭ la germanajn, francajn kaj norvegajn literaturaĵojn.

Lingva problemo, aŭ pardonpeto de redaktoro

En la numero 2/2008 de nia Bulteno mi aperigis poemon „Padlý den“ de Rudolf Vévoda esperantigitan de Jaroslav Krolupper sub titolo „Falita tago“.

Legantoj atentigis min, ke la titolo „Falita tago“ estas erara, ĉar ĝuste devus esti „Falinta tago“. Se la ĉeĥa nomo de la poemo estus „Poražený den“, tiam la Esperanta nomo estus „Falgita tago“.

Kiel redaktoro de Bulteno mi komprenis la formon „Falita tago“ kiel poezian licencon, kie la tradukinto la sufikson –ig- simple forigis, por havi malpli longan formon de la vorto (faligita – falita). Cetere ankaŭ la „Plena Analiza Gramatiko de Esperanto“ en la § 119 koncedas, ke „ĉe la pasivo la transitiviga afikso **ig** estas forlasita antaŭ la pasiva sufikso **it**, ĉar tiu ĉi sola sufiĉas por montri, ke al la primitiva radiko oni donas transitivan signifon“. Fakte ankaŭ laŭ la „principo de sufiĉo“ la sufikso –ig- povas esti forlasita, kiam tio ne kaŭzas ŝanĝon de signifo de la vorto.

Fine mi konstatas, ke mi pretervidis la diferencon de la vortoj „padlý“ kaj „poražený“ (falinta – faligita) kaj opiniis la formon „falita“ sufiĉa. La tradukinto mem konstatis, ke pri poezia licenco li tute ne pensis jak la vorton „falita“ li uzis senpripense, erare.

Sekve mi petas pardonon de legantoj pro la okazinta eraro kaj samtempe mi ĝojas, ke leganto(j) vere legas nian eldonaĵon kaj atentigas pri (Sporady) eraro(j).

Jiří Patera, redaktoro

Zdenka Bergrová

Když taje sníh,
to jsem já,
do stříbra utajená žluť.
Když ptáci padají z hnízd,
to jsem já,
čirá.
Když listí umlká,
to jsem já,
sněhobílá.
Když ještě potom
slunce vychází,
to jsem já
v krůpějích
lila.

Nabito úžasem
kyvadlo námi cloumá,
už úpí nablízku
i srdce s puklinou
a kde ten život je?

Kde čeká, kde se ztrácí?
Byl to tak rychlý let,
že zůstal za námi?

Kiam degelas neĝo,
tio estas mi,
en arĝento kaŝita flavo.
Kiam birdoj falas el nestoj,
tio estas mi,
subtila.
Kiam folioj eksilentas,
tio estas mi,
brila.
Kiam ankoraŭ poste
la suno leviĝas,
tio estas mi
en gutoj
lilaj.

Plenigita per mireĝ,
nin pendolo skuas,
suferas jam proksime
la koro fendiginta.
Kie la vivo estas?
Kie atendas, perdiĝas?
Ĉu estis ĝi tiom rapida,
ke ĝi restis post ni?

Esperantigis Jaroslav Krolupper

Jiří Hrcuba

Vitrogravuro – mia heredaĵo

Mia heredaĵo estas la loko, kie mi naskiĝis. Mia heredaĵo estas ankaŭ la familia tradicio. Ĉiuj miaj antaŭuloj labori kun vitro. Kiel knabo mi asistis mian patron en lia malgranda hejm-metiejo. Dektrijara mi fariĝis metia Levanto en vitrofabriko. En la jaro 1945, deksepjara, mi eniris la vitrolernejon en Nový Bor, ke la plej influa instruisto estis Stanislav Libenský. Mia heredaĵo progresi sen novan dimension.

En la praga Akademio por Arto kaj Desegnado dominis la profesoro Josef Kaplický. De la 1958-a mi praktikis 3-jaran aspiranto-studon. Mi povis koncentriĝi al esplorado de la temo „Novaj manieroj en la vitro-gravurado“. Mi estis 30-jara kaj mia verko fariĝis sendependa. Mi ekstartigis mian propran vojon. Mi partoprenis en la plej gravaj mondaj ekspozicioj – nome EXPO 58 kaj Triennale en Milano, 1958. Mi ŝanĝis la kupro-radon per ŝtonaj radoj ĉe la granda ŝlifmaŝino.

De la jaro 1961 mi fariĝis permanenta instruisto pri gravurado kaj skulptao. La sesdekaj jaroj fluis en granda tajdo. Arto tutmonde interkontaktiĝis spite la „ferkurtenon“. Miaj gravuraĵoj fariĝis pli abstraktaj. Mi uzadis la „V-forman“ ŝtonradon por krei la „Urbojn“, kiuj ekhavis geometrian strukturon. Tio estis prezentita en London, en la 1965-a jaro. Mi pasigis unu trimestron en la Royal College of Art. Tio estis plua tempo por malkovri kaj lerni novajn spertojn. De la jaro 1964 Libenský estis nomita profesoro de la vitro-prilaborado en la Akademio de Arto kaj Disegno en Prago. Mi fariĝis lia asistanto. En la jaro 1971 mi estis forigita el la lernejo. Dum la sekvantaj 20 jaroj mi laboris sendepende en mia propra studejo.

Mia „Smetana“ estis akceptita por la ekspozicio „New Glass“ (Nova vitro) en Corning, 1971. En la jaro 1983 invitis min Tom Buechner por prelegi pri la vitra arto okaze de la konferenco en Tuscon. Mi komencis instrui en Usono. Eĉ kiam mi estis nomumita profesoro de la praga Akademio, post la j. 1989 (en la j. 1991 mi fariĝis rektoro de la lernejo), mi ne ĉesigis mian instruadon en eksterlando.

Mi malkovradas rilatojn inter prahistoria gravurado kaj arto nuntempa. La primara arto estas plej potenca. Gravuri – tio signifas postlasigi spurt de la rado, aŭskultadi parolon de la rado, postlasi siajn proprajn premsignojn. Tio ne koncernas perfektech. Skizoj aŭ nefinitaj gravuraĵoj estas kutime pli bonaj. La rado liveras al la verko abstrakten formojn. En nuntempo la diamanto-radoj anstataŭas la kupro- kaj ŝtonradojn.

La „intajlo-gravurado“ kreas specifan skulpturan valoron.

La heredaĵo signifas ĉion, kion ni kapablas ekkompreni, selekti kaj transdoni al venonta generacio. Ni estas la ligilo inter pasinteco kaj futuro.

(El la angla esperantigis Inĝ. Margit Turková)

David Whitehouse, Direktoro de la Corning Muzeo de Vitro, Usono

De la nova mondo

Jiří Hrcuba vizitis Usonon unuafoje en la jaro 1983. Invitis lin Tom Buechner, la direktorko de la Muzeo de Vitro en Corning; kaj de Corning li veturadis ĉiujare por konatiĝi kun Ameriko. Estis tio senfina vojaĝo. Jiří ekkonis Amerikon, kaj dank' al li multaj amerikaj vitro-artistoj spertis gravuron. Tio estis unu el feliĉaj kontaktoj, kiuj malkovric novajn vojojn al ĉiuj, kiuj estis en ili interesiĝintaj.

Jen – kial: de la komenco Jiří estis la inspiranto. En la 1983-a Dále Chihuly invitis lin al Pilchuck, ke tiutempe la malvarma tekniko apenaŭ ekzistis. Por demonstri eblojn de l' gravurado, Jiří devis improvizi. Li fiksas pecon de borhelico en vajcon, faris kupro-radon kaj per tiuj ĉi simplaj iloj li gravuris vitron. La invento funkciis. En la 1984-a li revenis al Pilchuck por fari bezonan instalon de la malvarma metodo kaj la sekvan jaron – jam la aŭtoritato definitiva – li ekkreis programon por la koncerna gravur-tekniko.

Post tiu unua konatiĝo kun la Nova Mondo, Jiří fariĝis ofta vizitanto de Usono, vojaĝante krucmaniere la landon por trovi interesiĝantojn pri gravuro, montrante la potencon de l' gravurado, kaj instruante pri la fako. Li mem parolas elokvence pri sia ĝojo koncerne la edukadon, kaj en la videobendo farita en la majstroklaso en Corning en la j. 1998, li parolas ŝerce indikace sin mem Johnny Appleseed de vitrogravurado en Ameriko. Komprene, ke Jiří ne estis la unua vitrogravuristo en Ameriko – eĉ se oni parolas pri malnovaj tempo jen Corning – sed en la 1980-aj jaroj li alspiris novan vivon en la tradician metion kaj alkondukis novajn disĉiplojn en la mirindan formacion de malnovaj gravurteknikoj.

La rilatoj kun usonaj gravuristoj pliiintensiĝis, kiam li establigis Lernejon de Dominik Biman en sia naskiĝurbeto Harrachov, en Kamenický Šenov kaj en Frauenau. La unua lernejo ekstartis en la j. 2001 kaj sian agadon ĝi daŭrigas ĝis nun. La lernejoj estas malfermitaj por gravuristoj spertuloj kaj por komencantoj, kiuj havas eblecon tie ĉi realit siajn artajn imagojn. Jiří surpaŝis sian vojon – partoprenigi la usonajn kaj aliajn fremdlandajn interesiĝantojn.

Tie ĉi estas kelkaj kulminaĵoj de la usona „odiseado“ de Jiří Hrcuba. Lia verkaro aperis en la ekspozicio New Glass (Nova vitro) – la tutmonda superrigardo pri la fako, en Corning, 1979, kaj sekve ĝi estis sendita al aliaj kvar ŝtatoj en Usono, kaj al Victoria and Albert Museum, en Londono. Kvin jarojn poste, dum la konferenco organista de la Asocio por Vitroarto, Corning, Jiří estis „spiritus agens“ de pionýra kurso por gravuro (ĝi okazi sen unu el bazaj lernejoj), kaj tiun agadon li daŭrigis, jaron post jaro, ankaŭ en aliaj usonaj urboj. El multaj liaj ecoj, tiu, kiu al mi forte imponas, estas ke Jiří neniam antaŭenstarigas sin mem. Li ja estas instruisto, ne ia „rock star“ ...

En la jaro 1988 Jiří estis honorita pro alia agado en sia kariero, kiu eble ne estas tiom konata al homoj, kiuj estas ligitaj kun lia gravurlaborado.

Jiří estas elstara desegnisto por moneroj kaj medaloj, kaj la Amerika Numismatika Societo diplomis lin per J. Sandfort Saltus medalo pro lia tutviva sukceso en la medaloarto. La intajla gravurado, farita en metalo, ebligis al li realit proponojn kun reliefo, kiu diferencas de la tradicia medailista arto. En la j. 1995 la Muzeo en Corning honoris Jiří per sia plej signifa honoris. Ni proponis lin por „Rakow Comission“. Tiu fujara honoris rekonas nov- kaj progres- aferojn en la koncerna fako de la vitrogravurado. Ĝi estas subtenata per la testamento de la Muzeo de la plej signifaj donacintoj; per tiuj de gesinjoroj Rakow ni instigas artistou krei verkaĵojn, kiuj eniras la daŭran kolekton. La indikilo por prijuĝo estas „Kiu estas kiu“ en la nuntempa vitroarto, kaj la premioj, kiujn Jiří gajnis, lin plene rekomendas por la elektado koncerne de elstara gravuristo. Li kreis portretojn de du homoj, kiujn li tre admiris. Vladimír Kopecký – pentristo kaj skulptisto, kiu instruadis en la Akademio de Aplikaj Artoj en Prago, kaj Václav Havel – estinta prezidento de Ĉeĥa respubliko. La kontaktoj de Jiří kaj Corning, kiuj komenciĝis ĉe *New Glass*, en la 1979 j. kaj estis firmigitaj en la jaroj 1983 – 84, ŝanĝis sian direkton en la j. 1997, kiam li instruis en la kurso, tiam antaŭ nelonge establita, „Studejo de la Corning-Vitro-Muzeo“. La „Studejo“ estas lernejo por vitroprilaborado, kiu proponas al studentoj studi en kurso-klasoj sur nivelo de eksperimentoj kaj fakospertoj. Jiří jam instruis en la unua gravur-kurso kaj de tiam li revenadas ĉiujare por instrui en unu – aŭ du klasoj. Liaj meritoj kaj lia lingjara kontakto kun Corning estis substrekitaj en la j. 2005, kiam li estis elektita kiel Honora Membro de la Muzeo (membroj de la Muzeo de la Vitroarto, Corning, estas en la mondo esltaraj profesoroj pri vitro, kolektistoj, vendistoj kaj vitroproduktistoj).

Tradicie la radgravurado estas pedanta kaj ĉiuminute precizon postulanta laboro. Ni rigardu la portreton de la „heroo“, kiun Jiří admiris – en la 19-a jarcento vivanta bohemia gravuristo Dominik Biman: oni vidas ĉiun haron sur lia kapo.

Jiří atingis sian celpunkton. Li konservas plenan respekton por la tradicio, sed – por esplori novajn eblojn, li strebas abandoni la tradiciajn manierojn kaj ataki la materialon per nova vitaleco kaj spontanea senso, kio produktas neforgeseblajn – ja iam eĉ ŝokajn portretojn de artistoj, intelektuloj kaj politikaj gigantuloj, ĉu vivaj, ĉu mortintaj. Jiří instigas nin mergli en la fenomenon, kiun li nomas „Zeno de l’ desegnado sur la vitro“: do forgesi siajn skrupulojn, desegni spontaneece. Esti kiel infano – pli profunde – esti kiel antaŭlernejano, kiun ankoraŭ la edukmanieroj ne sukcesis konforme formi – tiel urĝe li parolas al siaj studentoj.

Jiří neniam haltas. Eble li iam malfermis la „fortun-libron“ kaj legis tie ĉi moton, kiu ne povis esti pli trafa: „Vi ŝatas defiojn“. Kaj li vere ŝatas. Lia antaŭnelonga malkovro de Bullseye lin prezentas per du: kreo kun la kolorfenomeno kaj laboro kun nekonata mediumo (diferencaj vitroj havas vardajn ecojn, kaj Jiří – la instruisto, studis specifajn ecojn de tiu ĉi „Bullseye-vitro“). En la nuntempo li prilaboras la „Steuben-vitro“-n, por interpreti siajn imagojn en la koncerna mediumo – senkolora plumba vitro – kio apenaŭ povas esti pli tradicia.

Jiří Hrcuba priskribas sian vivon kiel nefinitan kanton kaj diradas: „Mi ankoraŭ estas kantanta.“

(El la angla tradukis en Esperanton Inĝ. Margit Turková)

*La mondkonata ĉeĥa artisto **prof. Jiří Hrcuba** la 6-an de decembro 2008 fariĝas 80-jara. Li dediĉas sin al vitro-gravurado kaj medal- kaj moner-kreado. Lian „kvinkronan moneron“ ni ĉiuj bone konas. Profesoro Jiří Hrcuba, membro de nia esperantista klubo, estas aŭtoro de nerealigita monumento de D-ro Zamenhof en la banloko Františkovy Lázně, kie la originan monumenton de D-ro Zamenhof detruis germanaj faŝistoj en la jaro 1939.*



*Svetově proslulý český umělec **prof. Jiří Hrcuba** se 6. prosince 2008 dožívá 80 let. Věnuje se tvorbě řezaného a rytého skla a také medailérské tvorbě a tvorbě mincí. Jeho „pětikorunu“ všichni dobře známe. Prof. Jiří Hrcuba je členem našeho esperantského klubu a je autorem nerealizovaného pomníku tvůrce esperanta Dr. Zamenhova pro Františkovy Lázně, kde původní pomník zničili němečtí fašisté v roce 1939.*

NOVOROČENKA 2002

Břehy se zavřely ledovcově.
Sukničky průhledové napoví,
že hnízdiště jsou už opuštěná.
S démantovou čelenkou kráska spí.
Do jarních tání má být trpělivá.

Zelený věnec na dveřích
na ojíněném dvorku
už dávno ohlásil,
že advent se naplní,
až zrodí se děťátko,
naděje pro lásku.

Rozžatá svíčka na svátečním stole,
káva a moučník na talířku,
hladivé slovo umět říci –
tolik je poezie nedoznělé.

Věra Ludíková

KRISTNASKA KAJ NOVJARA POEZIO 2002

La bordoj fermiĝis glacie.
Jupetoj diafanaj sufloras,
ke kovboj estas jam forlasitaj.
Kun diamanta diademo berlino dormas.
Ĝis la printempa degelo ĝi devas pacienci.

Verda florkrono sur pordo
sur prujnkovrita korteto
jam antaŭlonge anoncis,
ke la advento plenumiĝos,
kiam naskiĝos la infaneto,
espero por la amo.

Brulanta kandelo sur solena tablo,
kafo kaj deserto sur telereto,
scii diri karesan vorton –
tiom da poezio nefinsonanta estas.

Věra Ludíková
Traduko: Jaroslav Mráz

PhDr. Kamila Bártlová – Lampířová

Poemo skribita propramane de Petr Bezruč

Báseň napsaná vlastnoručně Petrem Bezručem

Ĉi-jare rememorigas niaj meidumoj la datrevenon de forpaso de la poeto Petr Bezruč, kiu mortis en Olomouc en la jaro 1958.

En la ĉi-jara januaro en ekspozicio de poŝtmarkoj, leteroj kaj tradukitaj verkoj de la tutmondaj kaj ankaŭ de niaj klasikuloj en Esperanton, estis en la ceremonia salono de la urbeto Okříšky ankaŭ la poemlibro de Petr Bezruč „Sileziaj kantoj“.

En la jaro 1949 vizitis esperantistoj el Anglio, Belgio kaj Nederlando nian Ĉeĥoslovakian respublikon. La aŭtobuson kun tiuj ĉi gastoj bonvenigis en Třebíč profesoro Theodor Kilian kun ceteraj anoj de la loka Klubo de esperantistoj. En solena vespero en hotelo Slávie eksonis ankaŭversoj de niaj klasikuloj. Mi havis la honoron reciti tradukojn de poemoj – ekz. de Jan Neruda, Otakar Březina, Petr Bezruč kaj de aliaj aŭtoroj. Mi recitis parkere iliajn superbajn versojn. Aparte plaĉis Balado montara de Neruda kaj Maryčka Magdonova de Bezruč.

Multaj el la gastoj fariĝis niajn multjaraj amikoj, kun kiuj ni korespondis. Kelkaj angloj deziris, ke mi sendis al ili „Maryčka“ de Bezruč. La versoj pri ŝi kaj ŝia sorto katenis ilin. Kaj tial la mano de ĉeĥa studentino kopiis, ĉar skribmaŝinon mi ne havis, mi kopiis kaj kopiis 12 strofojn de tiu ĉi poemo en Esperanto:

„Hejmen foriris el Ostrava Magdon,
haltis vespere en Barton Brandejs ...“

Ankaŭ la amikoj el Nederlando esprimis deziron reciti tiujn ĉi tradukitajn versojn de ĉeĥaj klasikuloj. Kaj al mi kiel dankon ili sendis poemon de nederlanda aŭtoro pri Jan Amos Komenský, tradukitan en la internacian lingvon Esperanto.

Mi ne supozic, ke iuj el niaj gastoj, plejparte la angloj, sian admiron al versoj de Petr Bezruč esprimos per tio, ke ili sendos al li dankleterojn. Kaj en ili menciis tion, ke en Třebíč recitis ilin esperantistino, kiu la versojn al ili laŭdezire sendis.

Kaj tiel la solena vespero de amikeco kun niaj eksterlandaj gastoj en la jaro 1949 estis ĝojplena ne nur por ili, sed neatendite ankaŭ por mi en la jaro 1955.

Petr Bezruč enskribis sur la titolpaĝon de Sileziaj Kantoj per plumo propramane pluan sian poemon. Ĝi estas tipa por la aŭtoro laŭ vidpunkto enhava kaj ankaŭstila. En la libron li enmetis ankoraŭ leteron, en kiu li dankas al mi por la propagando de liaj versoj inter eksterlandaj esperantistoj kaj li eĉ enpensiĝis pri mia familia nomo. Li klarigas, kiel oni skribas en Germanio, en Bohemio, en Moravio kaj en Silezio. En la fino de la letero li skribas: „Sed mi estas el la gento, kiu longajn sonojn tute ne konas, kiel poloj...“

Por mi lia donaco – la libro kun omaĝo kaj plua poemo – konfirmas la fakton, ke Esperanto krom la amikeco ebligas, ke ni proksimigu niajn kulturvalorojn – kaj ne nur la literaturajn – al amikoj de ĉiuj kontinentoj.

SLEZSKÉ
PÍSNĚ

Petr Bezruč

Nech po městě, nech venku sám
jdu lesem chladným stínem jívy,
ten dojem vždycky v duši mám:
kůň za mnou letí polodivý.
A nelze bokem uskočit,
jdou strmé hráze úzkou poutí:
nikde se nelze zastavit,
nikde mi nelze spočinouti.

Kaj en urbo, kaj ekstere
en frida ombro de arbaro
sentas mi, ke iucele
sovaĝa sekvas min ĉevalo.
Jen ne eblas flanken salti,
meze de dvoj vojo streta:
mi nenie povas halti,
nenie estas lok' kviet.

28. X. 1955

Esperantigis Jaroslav Krolupper

Kara, mi dankas al vi por la afablaj vortoj en la letero kaj por la atentemo, kiun vi al mi inter esperantistoj dediĉis. Sed konfuzis min en via nomo la longa á – Bartl estas mallongigo de la germana nomo Bartolomeo kaj ĝi estas inter germanoj firme disvastigita. En Sileio kaj en Moravio sonas la mallongigo Bartek. En Bohemio oni skribas Bárta (Sv. Čech en la poemo En ombro de tilio), en Moravio kaj en Silezio Barta. Per plilongigado de vokaloj en Bohemio tiom populara, la lingvo akiras trajton infanecan. Sed mi estas el gento, kiu longajn sonojn tute ne konas, kiel poloj.

Tial ne koleru kaj estu sana!

Bezruč 28. X. 55

La letero kune kun la libro „Slezské písně“ estis sendita el la poŝtoŝicejo Kostelec na Hané la 1-an de novembro 1955 – registrite n-ro 489 – al la adreso: Kamila Bártlová, instruistino, Okříšky n-ro 94.

PhDr. Kamila Bártlová – Lampířová

Komenio kiel artisto de vorto

Kun tiu ĉi titolo la Masaryk-universitato en Brno eldonis en la j. 1992 libron de sia profesoro Milan Kopecký. En tiu ĉi monografio la aŭtoro koncentriĝis al la episkopo de Unuiĝo de Fratoj – Komenio – laŭ la vidpunkto de la literatura arto de lia science verkaro pedagogia, filozofia, sed ankaŭ de beletraj verkoj kaj dialogoj.

Ni menciuj iujn ideojn de Komenio en konekso kun la tiama literaturo, tempo kaj ankoraŭ la aktualecon kaj postlasaĵon de liaj opinioj por nia jarcento.

En la unua ĉapitro de la monografio profesoro Kopecký memorigas landojn kaj urbojn, kiujn J. A. Komenio kiel ekzilito vizitis, kaj lokojn, kie li vivis inter la jaroj 1628 – 1656. La aŭtoro prezentas parton de letero al Petro Montano el la j. 1661, kiam Komenio skribas el Amsterdamo al sia eldonisto kaj esprimas sian amon al la gepatra ĉeĥa lando kaj al la patrina lingvo: „Antaŭ ĉio mi deklaras, ke latinlingve mi neniam intencis ion verki, tiom pli eldoni. Nur al mia nacio mi klopodis utili kaj verki iujn librojn en la gepatra lingvo.“

Bedaŭrinde nur en la fremda medio li povis krei siajn artajn verkojn, en kiuj li jam koncentriĝis al la problemaro de latuta homaro – al la verkoj pansofiaj, eĉ se li entuziasme emfazis la signifon de la gepatra lingvo kaj de la literatura valoro de la antaŭblankmonta Bohemio.

Komenio ekkonis, ke la lingvodiverseco estas ofte la kaŭzo de miskompreno kaj kvereloj. La marnavigado ebligis rekontiĝadon de homoj de diversaj kontinentoj. Pro tio Komenio pensas pri la bezono de nova lingvo – apud la gepatra – kiu al la homaro ebligus komunikadon inter diversaj nacioj. Kun tiu ĉi ideo li renkontiĝis en Anglio en la verko de Ludoviko Vives, kiu jam antaŭ cent jaroj esprimis la neceson de universala lingvo. Kaj tial Komenio dum sia restado en Anglio prezentas la ideon pri la nova artefarita lingvo en sia libro „Via lucis“ (La vojo de la lumo) kaj poste li jam prilaboras specimenojn de lingvo, kiu devus esti „... pli facila, pli agrabla kaj pli perfekta...“. En la verko „Panglottia“ estas eĉ ekzemploj, kie Komenio eliras el fundamentoj de latinaj vortoj kaj prezentas principojn de vortkreado de la internacia lingvo.

En Panglottia Komenský ankaŭ emfazas, ke „... Eĉ neniu el la vivaj lingvoj, kvankam la plej kulturita, konvenas...“ kaj klarigas, ke la artefarita lingvo apartenus al neniu, sed al ĉiuj nacioj. Komenio ankaŭ rimarkigas, ke per la lingva egaleco komenciĝas la homa egaleco de grandaj kaj malgrandaj nacioj.

Komenio skribis: „Mi elpaŝas publike kun sopiro alkonduki al la mondo aŭ novan torĉon aŭ almenaŭ novajn fajrerojn por ekbruligo de nova torĉo... Vere estas tempo, por ke ni post ĉiuj pasintaj jarcentoj esperu je aferoj pli grandaj kaj pli grandajn aferoj ni provu fari.“ Tial la „instruisto de nacioj“ estas rekonata kiel la fondinto de interlingvistiko.

Unuopaj ĉapitroj de la libro de d-ro Milan Kopecký alprosimigas Komenion en la konekso de literaturo de la tempo, kiam li vivis, la taksadon de unuopaj verkoj en la paso de jarcentoj de edukaj procesoj, kaj ankaŭ la ĉapitron de la Komenia teorio de literaturo.

D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof kompilis laŭ la principoj de Komenio artefaritan lingvon. Ĝi estas nomata ESPERANTO.

Kaj antaŭ cent jaroj estis fondita la esperantista asocio – Universala Esperanto-Asocio – UEA.

La Ĝenerala asembleo de UNO proklamis la jaron 2008 La internacia Jaro de Lingvoj. Plenumiĝas la vortoj de Johano Amoso Komenio – la homaro havas la lingvon de amikeco, per kiu interkompreniĝas homoj de ĉiuj kontinentoj. Kiel egalulo kun egalulo – de grandaj kaj ankaŭ de malgrandaj nacioj. Tial la esperantistoj de ĉiuj kontinentoj konas la nomon de nia pensulo Komenio.

La citita monografio de Milan Kopecký, eldonita de Masaryk-universitato en Brno por la 400-a datreveno de la naskiĝo de la „Instruisto de nacioj Komenio“ klarigas la taskojn kaj celojn de la nuntempa komeniologio.

(Esperantigis Jiří Patera)